# INTERNI

estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

**Numero 240** — — • — • • • — — — • • • — • • — — — **Aprilo, 2006**

**Laborantoj:**

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:
Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado estas $8, por Usono $12, kaj por aliaj landoj estas $20

☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ • • • • • — — • • • — • • — — • — — — — ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

## VOJAĜO AL KANADO

Inter la 29-a de aŭgusto kaj 26-a de septembro 2005, Ian Mac Dowall kaj mi akceptis la inviton de lia frato kaj vizitis Kanadon. En Halifax, Ian kaj lia frato jam atendis min ĉe la flughaveno. Nia celo estis la rando de Dartmouth en la provinco Nova Skotio (VE1)[1].

Pro atendita tajfuno (red.: laŭ mia memoro, temis pri tondroŝtormoj), ni nur post 3 tagoj povis elstarigi antenon. La Kellerman-dipolo[2] pendiĝis en alto de 8 metroj. En la arbaro apud la domo estis tre larĝa koridoro de arboj falintaj pro tajfuno (red.: uragano) de la pasinta jaro[3]. Tiun koridoron mi bone uzis, ĉar la direkto estis ĝuste al Eŭropo. La eter-kondiĉoj ŝanĝiĝis de unu minuto ĝis alia. De Eŭropo kaj Azio mi ricevis 59 plus 20 db-jn[4] kaj unu minuton poste nur 33.


Ni vizitis du radioklubojn, unue en Halifax (VE1FQ) kaj poste en Dartmouth (VE1YO)[5]. La plej interesa estis la vizito al muzeoŝipo „Acadia"[6]. Sur la pramŝipo inter Dartmouth kaj Halifax alparolis min homo, kaj mi vidis sur lia ĉapelo la voksignon VE1AI. Mi miris, ke li ekkonis min. Sed tuj mi rememoris, ke mia voksigno same estis sur mia ĉapelo. Sur la muzeoŝipo mi povis uzi la voksignon VE0MMA (Maritime Mobile Acadia – Marborda Movebla Akadio).


La akvo estis 20 gradoj en la oceano kaj en la lago (atingebla per stuparo de la domo). Ni multe migris kaj vizitis multajn interesajn lokojn. La Marconi-muzeo estis tro for. Sur la mapo la distanco estis nur malmultaj centimetroj, sed en la naturo ĝi estus dutaga vojaĝo (red.: tien kaj reen kun vizito). Dufoje ni renkontis la lokan Esperanto-grupon de Nova Skotio kaj konatiĝis kun novaj geamikoj. Multan dankon al ĉiuj gastigantoj!

En la fino estis en la taglibro 818 QSO-oj (red.: kontaktoj per radio, ofte uzante morsan kodon) el 94 landoj kaj ĉiuj kontinentoj. Inter ili estis nur malmultaj Esperanto-QSO-oj.

Ian kaj mi jam pensas pri la sekva vojaĝo. Ĉu denove EA7 (Hispanio), EA8 (Kanariaj Insuloj), EA9 (Melilla) aŭ iam VK (Aŭstralio), ZL (Nov-Zelando)... ni vidos.

Wolf Krüger, DL1CC, G4MR
Eisenhüttenstadt, Germanio
Prezidanto de ILERA[7]





Notoj de la redaktoro:

1 „VE1" estas radio-amatora indiko (voksigno) por la regiono de Nova Skotio.

2 Kellerman-dupoluso estas anteno kiu similas al inversa V, ligita al centra stango kie troviĝas kablo-konektilo por ligi al la radioricevilo. Laŭ la longoj de la V-flankoj troviĝas volvaĵoj kiuj efektive plilongigas la draton de ĉiu flanko.

3 Uraganoj kutime preterpasas la provincon de Nova Skotio, sed la 28-an de septembro 2003 uragano „Juan" frapis la marbordon proksime de Halifakso kaj moviĝis norden trans la provincoj de Nova Skotio kaj Insulo de Princ-Eduardo. Ĝi kaŭzis vastan damaĝon kaj kelkajn mortojn.


4 „db" estas mallongigo por decibelo


5 Atentaj legantoj jam scias, ke Dartmouth estas parto de la metropola regiono de Halifakso kaj troviĝas trans la haveno de la nov-skotia ĉefurbo.

6 Acadie (Akadio) estis la nomo de Nova Skotio dum la franca kolonia erao (dum la 150 jaroj antaŭ la mezo de la 18-a jarcento), kaj akadianoj plejparte estas la nuntempaj franclingvanoj de Nova Skotio, Nov-Brunsviko kaj Insulo de Princ-Eduardo.

7 Internacia Ligo de Esperantistaj RadioAmatoroj









. ... .--. . .-. .- -. - ---

## PRI LA „CSS ACADIA"

Kiel notis Wolf en sia artikolo, Akadio estas muzeoŝipo, kaj ĝi troviĝas en la halifaksa haveno apud la urbocentra kaj havenkvartala Marborda Muzeo de la Atlantiko. Kun modesta longo de 55,7 m kaj larĝo de 10,19 m, la grando de la ŝipo ne forte imponas ĉe la kajo. Tamen, la ŝipo havis elstaran karieron.

En la jaro 1913 oni lanĉis Akadion en Newcastle ĉe Tyne, Anglio. Konstruita dum la Eduarda erao en Britio, ĝi havis rektan pruon kaj gracian malantaŭaĵon. Kun du mastoj kaj unuopa fumtubo, ĝi aspektas pli kiel vapor-jakto ol laborema mezur-ŝipo. La kareno estis tiom forte konstruita, ke oni uzis la ŝipon kiel aldonan glacirompilon dum la fruaj jaroj, por kio oni neniam desegnis ĝin. La mallongigo CSS signifis aŭ „Kanada Scienca Ŝipo" aŭ „Kanada Mezur-esplora Ŝipo."

Akadio estis la unua ŝipo specife konstruita por mezuri la nordajn marojn ĉirkaŭ Kanado, kaj ĝi vojaĝis de danĝeraj, glaciplenaj regionoj en la Golfo de Hudson ĝis la suda marbordo de Nov-Skotio. Dum la fruaj jaroj, oni faris pionirajn hidrografajn esplorojn en la arktaj maraj akvoj de Kanado. Je la fino de la kariero, oni uzis la ŝipon por marmapi la marbordon de Novlando, post kiam Novlando fariĝis parto de Kanado en 1949, kaj ĝisdatigi aŭ krei tute novajn marmapojn.

Akadio estas la sola ankoraŭ ekzistanta ŝipo, kiun la Reĝa Kanada Mararmeo uzis dum ambaŭ mondmilitoj. De 1916 ĝis 1919 oni uzis ĝin kiel patrola kaj eskorta ŝipo. Ĝi ricevis malgravan damaĝon de la halifaksa eksplodo (la 6-an de decembro 1917) kiam ĝi servis kiel gard-ŝipo en la Bedforda baseno, kaj tial ĝi estas la sola ankoraŭ surakva ŝipo kiu supervivis tiun eksplodon. En 1939 oni servopretigis la ŝipon por uzi unue kiel patrolan, poste kiel trejnadan ŝipon, ĝis la fino de la milito je 1945.

Kiel ĝisdata ŝipo kaj grava parto de la Kanada Hidrografa Servo, Akadio ofte estis uzita por testi novajn teknologiojn. Tamen, malgraŭ la plejnova aparataro, oni daŭre uzis la trioble-ekspansiajn vapor-motorojn kaj du karbo-uzantajn kaldronegojn dum la tuta kariero. Tial ĝi estis raraĵo en la ŝiparo de la Hidrografa Servo, kaj oni facile rekonis ĝin per la nemisrekonebla spuro de nigra fumo.

Post 56 jaroj oni ĉesigis la servon de Akadio en 1969, kaj dum la venontaj 12 jaroj la ŝipo restis neuzata ĉe la Bedforda Instituto de Oceanografio (ĉe la dartmoŭta flanko de la halifaksa haveno). La antaŭa ŝipanaro daŭre volontulis por prizorgi ĝin, kaj en 1982 oni movis la nun nacian historiejon al ĝia nuna loko apud la muzeo. Tie oni daŭre konservas kaj riparas ĝin, kaj vizitantoj rajtas lerni pli pri ĝia kariero.

— Bob Williamson

• • • —   •   — — — — —   — —   — —   • —

## BEDAŬRESPRIMO

Ege ege malfrue vi ricevas la aprilan kaj la majan numerojn de ***Inter Ni***, kaj pro tio nur la redaktoro ŝuldas. Ŝajne mi tre mallaboremiĝis lastatempe. Mi multe pardonpetas pro tio.

— Bob Williamson
via redaktoro

## TESTU VIAN VORTSTOKON

Por ĉiu vorto, elektu la plej ĝustan difinon:

pigra
a) mallaborema
b) ema konduti kiel malpura parhufa besto kun volva vosto
c) kolorplena, kolororiĉa
ĉ) havanta guston de salita pasto

hordeo
a) tribo de nomada popolo
b) grajnoj uzataj por fari grion kaj bieron
c) ĥemia elemento
ĉ) muzika signo

helianto
a) enloĝanto de antikva Greklando
b) molusko kun spirala konko
c) volva kurbo ĉirkaŭ cilindro, alohava ŝraŭbforma aparato
ĉ) planto kun grandaj floroj

metonimio
a) subtera fervojo
b) stilfiguro kun vort-anstataŭigo
c) abdomena ŝvelo kaŭzata de intestaj gasoj
ĉ) atmosfera elemento aŭ fenomeno pri vetero

pedelo
a) peco de mekanismo, kiun oni movas per la piedo
b) malsupra oficisto de preĝejo aŭ universitato
c) instruisto aŭ edukisto de infanoj
ĉ) rano kiu loĝas en arboj

rubeolo
a) malgranda birdo
b) juvelŝtono
c) epidemia malsano
ĉ) titolo en periodaĵo indikanta la specon de temoj sube pritraktitaj

aspergi
a) fervore deziri ion altigan, glorigan
b) ŝprucigi likvon sur iun aŭ ion
c) diri ion malfavoran pri iu, mallaŭdi
ĉ) partopreni en sekretaj ritoj

[solvoj en venonta numero]